

John Ellerton, The day Thou gavest, Lord, is ended	John Ellerton, Forpasis tiu tag', Sinjoro	John Ellerton, Ni estis ja en mano Dia	John Ellerton, Finiĝas nun alia tago
--	---	--	--

*tradukita de Frieder
Weigold*

*tradukita de Manfre-
do Ratislavo*

*tradukita de Wil-
liam John Downes*

1. The day Thou gavest, Lord, is ended, The darkness falls at Thy be- hest; To Thee our morning hymns ascended, Thy praise shall sanctify our rest.	1. Forpasis tiu tag', Sinjoro, Kaj profundiĝas la senlum'. Vi gardis nin de ajn doloro. Nin gardu ankaŭ dum noktum'!	1. Ni estis ja en mano Dia, dum brilis super ni la Sun'. Protektu nin per ma- no Via dumnokte, Dio, an- kaŭ nun!	1. Finiĝas nun alia tago, jam venis la vespera hor'. Kunvenis ni por ad- orago plaĉanta al la Di- Sinjor'
--	---	---	--

2. We thank Thee that Thy church, unsleeping, While earth rolls onward into light, Through all the world her watch is keeping, And rests not now by day or night.	2. Ni rotacias en la tagon. En nokta paco dor- mas ni. Kaj portas lumon trans la maro La suno, kie brilas ĝi.	2. La ter' cirkulas ĝis la veno de l' nova tag', ripoz- as ni dum tiu nokt' en Via beno ² ĝis la mateno, kara Di'.	2. Ni dankas Vin, Savanto nia, ke sur la tuta mond- teren' la sankta eklezio Via staradas firme ĉe posten'.
--	--	--	--

3. As o'er each continent and island The dawn leads on another day, The voice of prayer is never silent, Nor dies the strain of praise away.	3. Senĉese kiel la mateno Briladas super tera rond', Eksonas laŭdo pro la beno Al ĉiu sur la vasta mond'.	3. Nun kiam en mal- hel' fordronas la Sun' en tiu ĉi ves- per', multvoĉe Via laŭdo sonas alialoke sur la Ter'.	3. Ruliĝas tero, bri- las lumo de ne-ĉesanta maten-glor'. Leviĝas laŭdo, preĝ- parfumo konstante, kiel dolĉ- odor'.
---	--	--	--

4. The sun that bids us rest is waking Our brethren 'neath the we- stern sky, And hour by hour fresh lips are making Thy wondrous doings heard on high.	4. La suno, kiu ĵus subiris, Ja brilas en plu fora land'! La gloron, kiun ni admiris, Anoncas plu preĝada kant'.	4. Ĉar kiel estas ĉirkaŭanta la Teron lumo de l' maten', senĉese estas pluso- nanta preĝado de la homoj jen.	4. Ekdormas ni post sun-subiro; gefratoj en la okci- dent' vekiĝas kun novtag- aspiro Vin glori per viv- elokvent'.
--	---	---	--

...

...

...

...

²aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

5. So be it, Lord; Thy throne shall never, Like earth's proud empires, pass away: Thy kingdom stands, and grows forever, Till all Thy creatures own Thy sway.	5. Pereas regnoj. Tiel estu! Kaj sole staras via tron', Ke sole via regno re- stu Je fina tag' sub unu kron'.	5. Ja estas, Dio ĉiopova, senlima Via regno, nin konduku al la tago nova en Via regno je la fin'!	5. Formortos mon- daj imperioj, sed Via regno kres- kos plu. Al Vi sin cedos di- nastioj, Venkinto estos vi, Jesu'!
...

Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas JOHN ELLERTON (*1826-12-16 – †1893-06-15), publikigita 1870.

Arg-130-255 (2008-11-08 14:47:39)

Information about the author can be found on the website http://www.cyberhymnal.org/bio/e/l/l/ellerton_j.htm.

Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.

Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)

Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kant-libro “Gotteslob” (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muzik-notoj troveblas ankaŭ en la retejo http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf.

Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de MANFRED RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2004-01-10.

Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)

Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de WILLIAM JOHN DOWNES (*1892 – †1987).

Arg-130-302 (2004-02-04 11:38:05)

Tiu ĉi traduko aperis en la Ekumena Diserva Libro “Adoru”, eldonita en 2001 de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj Kristana Esperanta Esperanto-Ligo (KELI), kanto numero 153.